

kreiva dialogo inter instruisto kaj lernanto. La aŭtoroj evoluigas multajn flankojn de tiu ĉi procezo kaj akcentas la gravan rolon de perfektigo flanke de la instruisto. Samtempe oni pridiskutas la multkulturan dialogon kiel rimedon de formigo de pacema, tolerema kaj senperforta rilato de la lernantoj al la mondo.

Plialtiĝon de la efiko en la funkciado de dialoga teknologio dum la pedagogia procezo oni vidas en la transformigo de ĉiuj komponantoj (celoj, enhavo, metodo, rimedoj) en nekontraŭdira, komuna kaj integra sistemo. Tio koncentriĝas en anticipa detala projektado por la lernantoj kaj pedagogoj. Ĉi tie gravas la teoria evoluo de la pedagogia teknologio – senĉesa, logika kaj sinsekva movado de inter si ligitaj komponantoj, etapo kaj statoj de la pedagogia proceso kaj agoj de la partoprenantoj. En la unua ĉapitro ĉeestas ankaŭ diskutaj elementoj pri la barieroj en la pedagogia proceso kaj la metodoj de ilia eliminado.

En la dua ĉapitro oni diskutas la uzadon de la dialogaj teknologioj en objektivaj sferoj de sciigo, en dulingva instruado, aspektoj de administrado de pedagogiaj integriĝoj inter landaj kaj eksterlandaj lernejoj, universitatoj kaj internaciaj organizaĵoj. Tie ĉi estas ankaŭ menciita la preparado de instruistoj al dialoga klerigo kaj edukado de lernantoj. Oni esploris la efikecon de dialoga instruado kaj multkultura edukado.

La projektado kaj realigado de dialogaj teknologioj en civila klerigado estis ekzamenita en la gimnazio n-ro 11 de la urbo Samara, asociiĝinta lernejo de UNESKO kaj ĝi fariĝis objekto, kie oni aprobis kaj esploris la efikecon de novaj konceptoj en la pedagogia procezo.

La libro estas bone eldonita kaj, escepte de iuj preseraroj, ĝi enhavas abundan teorion kaj praktikan materialon, science kaj kreive elaboritan. La moderna kaj ofte uzata faka terminologio ne vualas la sencon de la priskribo, kiu estas bone akceptebla kaj utila, ĉar ĝi estas ankaŭ elemento de la teorie-science fruktodona laboro de la aŭtoroj. La libro sendube estas aktuala por la lerneja instruistaro, edukaj instancoj kaj pedagogoj – nur bezonas esperantigon.

D-ro Vladimir SCOTKIN
Beruni Strato 31/50
UZ – 703050 – Samarkand
UZBEKIO
<holikmam@mail.ru>

Legantoleteroj

Estimata sinjoro redaktoro de *Scienca Revuo*,

La apudan artikolon, reago al artikolo aperinta en “Heroldo“, mi sendis al “Heroldo“ jam antaŭ ses monatoj, sed ties redakcio ne aperigis ĝin, pro kialoj al mi ne konataj. Do, se vi konsideras mian reagon aperigebla, bv. aperigi ĝin en via Revuo.

Antaŭdankas via *D. F. Bociott*

Ĝardeno en kiu kantas unu sola birdo

– Mi samopinias kun d-ro Renato Corsetti –

En la artikolo “Ties vizio ne estas la mia“ (HEROLDO 3/2008) la aŭtoro, merita iama esperantlingva ĵurnalisto, neas la aserton de d-ro Corsetti (fakte konatan veraĵon), ke Esperanto kapablas savi etnajn lingvojn kontraŭ malapero. Tiu ĉi relative nova erariga kontraŭesperanta “vizio“ en “Heroldo“ postulas atentan analizon. Jen nur kelkaj kritikaj rimarkoj pri la esencaj ideoj de la artikolo:

1. “... sed kio rajtigas supozi, ke Esperanto, se oni vaste uzus ĝin en la internaciaj rilatoj, ne kondukus same kiel la nunaj tutmonde plej fortaj lingvoj?”

a) Rajtigas la tiel nomata *laŭmodela pensado*, t.e. aparta hipotezo estas atentinda se pravas la *ĝenerala principo*, sur kiu ĝi baziĝas. Ĉikaze la principo estas: la internaciaj, neŭtralaj strukturoj (UNO, Ruĝa Kruco k.a.) ne endanĝerigas la naciajn strukturojn; tion faras nur etnaj, hegemoniaj strukturoj. Kontraŭ la jam videblaj negativaj influoj de la angla lingvo, aperis reagoj en kelkaj landoj, defende al propraj lingvoj.

b) Ne ekzistas propra “konduco“ de lingvoj, ĉar, sen la homa ago, ili ne estas kibernetikaj sistemoj. La latino, **kiel lingvo de antikva imperio**, detruis la lingvojn de konkeritaj dako, galloj k.a., sed dum la mezepoko, kiel simpla ilo por humanistoj, **do lingvo sen ŝtato**, ĝi malutilis al neniu etna lingvo.

2. “Pli realisme estas supozoj, ke Esperanto – ĉar facile lernebla – pli multloke kaj pli rapide iĝus universale konata en lokoj, kie kunvivas parolantoj de diversaj gepatraj lingvoj, ol nun ekzemple la angla”.

a) “Supozoj”, “pli realisme supozoj” pravigas nenion. Supozo rolas nur kiel sugesto por estonta esploro; ĝis la scienca rezulto, la supozo estas nek vera, nek falsa.

b) Neniam iu ajn kvalito de lingvoj (“facile lernebla“ k.s.) rolis en la progreso aŭ regreso de iu lingvo: ekz. la lingvoj de la Amerikaj praloĝantoj estis detruataj per la fajro-armiloj kaj ferocaj hundoj de la konkerantoj el Eŭropo, kaj tute ne per la “facileco“ de la eŭropaj lingvoj. Sur la nacia areo, venkis ne la plej taŭga dialekto, sed tiu de la regiono kun politika forto aŭ kultura prestiĝo (vd. la dialektojn *langue d’oil* en Francio, *Kursk-Oriol* en Rusio, *Florenco* en Italio, *Muntenio* en Rumanio ktp.).

3. “Ĝuste tiu universaleco de unu lingvo en multlingva socio estas kondiĉo por la rapida regreso de la aliaj lingvoj”. Kaj la konkludo de la aŭtoro: “Esperanto do ne nur *ne protektas la pluekziston de gepatraj lingvoj*, sed eĉ rapide mem iĝus gepatra lingvo de milionoj en mult-etnaj mondregionoj – koste de tradicie uzitaj etnaj lingvoj”. (Mi ne volonte partoprenas diskutojn pri senbazaj hipotezoj, kiaj estas la ĉitieaj. Tamen, ni akceptu ankaŭ tiun ĉi defion).

a) Neniu historia fakto pravigas (ĝis nun) la opinion, ke universaleco de iu lingvo (do *de ĉiu ajn lingvo!*) estas kondiĉo por regreso de aliaj lingvoj. Tio povas esti vera se temas pri universaleco de *etna* lingvo, ĉar ĝi kaj la institucioj, kiujn ĝi servas, estas ekskluzivaj: *aŭ-aŭ*; ili anstataŭas la naciajn lingvojn. Jam hodiaŭ la naciaj lingvoj kvazaŭ malaperis en diplomatio, turismo, scienc-teĥnikaj revuoj, anstataŭigataj per la angla lingvo.

b) Se neŭtrala lingvo fariĝus universala, ĝi funkcius, same kiel la internaciaj hodiaŭaj strukturoj, laŭ la principo *kaj-kaj*, ĉar neniu havus intereson anstataŭigi per ĝi la propran lingvon. Tute ne ekzistus la neceso rezigni pri “la unua granda poemo“ (*Blaga*) de ĉiu popolo, mortigi la propran kulturon (beletro, filozofio, scienco ktp.). Finfine, konforme laŭ la ĉi-supre diskutita “vizio“, la estonta mondo fariĝos unulingva, ĉu per hegemonia etna lingvo, ĉu per neŭtrala, do la feliĉa estonta mondo similos al ĝardeno, en kiu kantas unu sola birdo! Tio estas, mia opinio, fantaziaĵo.

4. Eĉ pli spekulacia ŝajnas la lasta aserto, kiu celas kontraŭi la konatan tezon, ke Esperanto altrudas nenium mondrigardon. “Se Esperanto ĝeneraliĝus kiel internacia lingvo en estonta mondo de ideologie trudemaj ŝtatoj kaj aliaj sociaj institucioj, tiam Esperanto kompreneble uziĝus por altrudi mondrigardojn.”

a) Estas tute necerta estonta “mondo de ideologie trudemaj ŝtatoj“. En la politika filozofio ekzistas teorio, laŭ kiu malaperos la ŝtatoj en siaj hodiaŭaj formoj kaj ili havos nur administrajn funkciojn. Entute, trudemaj ŝtatoj povus esti ĉiuj ajn naciaj ŝtatoj, do ebla solvo estus nur neŭtrala strukturo.

b) Ni revenu al la jam menciita *laŭmodela pensado*: la internaciaj, *neŭtralaj* strukturoj ne povas esti utiligataj por altrudi unuopan mondrigardon. (Kies mondrigardon?) Sed ili devas esti vere *neŭtralaj*; ankaŭ NATO estas pli aŭ malpli “internacia“, sed ne neŭtrala, tial ĝi fariĝis instrumento de hegemonia ŝtato.

c) Kion oni devas kompreni per “mondrigardo“? Se temas nur pri “la senco de vivo kaj morto“, ĝi estus politike sensignifa kaj ankaŭ ŝanĝebla dum la historio. Ĉiukaze ni konsciu, ke la lingvoj mem ne havas propran mondrigardon, kiel asertas iuj pedantaj filozofoj de la lingvo, sen demonstri sian aserton, paralelan al la nescienca teorio de la iama sovetia lingvisto *N. I. Marr*, laŭ kiu la lingvoj havas eĉ “klas-san karakteron“.

Suplementa rimarko. Mi konsultis fakulon pri Esperanto, ĉu la vorto “ties“ (en la titolo) vere havas, en tiu ĉi kunteksto, malŝatan kromsignifon, kaj li konfirmis tion. Se tiel estas, ni bedaŭru, ke en Esperanto aperas diversaj formoj de malrespekto pri niaj personecoj, kiuj fordonis fortojn, sciencajn kvalifikojn, kaj jarojn de siaj vivoj por nia idealisma afero. Ekstermovade ili ricevas nenium respekton pro tio. Ĉu decas, ke ankaŭ en Esperantujo ni ne vidas iliajn meritojn kaj almenaŭ ni ne montru al ili plenan respekton? Tio mortigas entuziasmojn kaj produktas damaĝojn al ĉiu ajn kolektiva laboro. Certe, pri ano de la Civito ne estas akceptebla tio, kio “taŭgos“ por la prezidanto de UEA! Bedaŭrinda sinteno!

Prof. Dr. Ignat F. BOCIORT
Wustrower Str. 1

DE – 13051 – Berlin / Germanio